

Historio de la esperanto-movado en Svislando per tekstoj el la revuo

Svisa Espero, 13-a parto

Radioprelego de Claude GACOND, SRI 758, 1978.04.19 & 21 & 22

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum prelegaro ni prezentos al vi historieton de la esperanto-movado en Svislando helpe de tekstoj, kiujn ni ĉerpos el la revuo *Svisa Espero*. Tiel ni markas la 75-an naskiĝaron de *Svisa Esperanto-Societo*.

A.- La duobla numero de septembro-oktobro 1906 aperigis tre detalan raporton pri la dua Universala Kongreso ĵus okazinta en Ĝenevo de la 28-a de aŭgusto ĝis la 6-a de septembro.

Cl.- Hodiaŭ ni citas al vi erojn el tiu raporto verkita de sinjoro Théophile Renard, la redaktoro de *Svisa Espero*.

A.- « La malferma kunsido rezervita al la kongresanoj » okazis la posttagmezon de la unua tago. « D-ro Zamenhof ... malfermas la kongreson. ... S-ro Gaston Moch ... legas deklaron pri la senco kaj neŭtraleco de Esperanto, dirante ke la programo de l' Kongreso ne permesos, ke en ĝeneralaj kunsidoj oni diskutu pri politikaj, religiaj aŭ sociaj demandoj. ... Tiuj demandoj povos esti diskutataj privatmaniere en ĉambroj, kiujn la Kongreso metas je la dispono de personoj, kiuj volas aranĝi tiujn kunvenojn. ...»

Cl.- La publika Solena Malfermo okazis en la teatro Victoria-Hall la vesperon. « Multaj ĝenevanoj allogitaj [de] la noveco de l' afero ... ĉeestas. ... La komitatoj de l' Kongreso kaj la delegitoj ... sidas sur la tribuno. ... S-ro Schneeberger, prezidanto ... diras koran akcepton. ... S-ro Bernard ... legas belan francan leteron de S-ro profesoro Ernest Naville ..., la unua scienculo, kiu prezentis publike Esperanton. ... S-ro Privat legas elegantan tradukon de ĉiu tiu letero. ... Generalo Sebert dankas ... la urbon Ĝenevo. S-ro Boirac, rektoro de l' Diĵona Akademio, en kelkaj spritaj vortoj komparas la aglon de Ĝenevo kun la Esperanta ideo, kiu trapasas fluge la montojn. ...

A.- D-ro Zamenhof leviĝas, meze de aplaŭdoj senfinaj kaj eldiras trankvile, dolĉvoĉe, belan paroladon. ... Li venas, kiel li diras, el lando kie oni batalegas por libereco kaj homaj rajtoj ; li aludas la okazintaĵojn de Bielostock, sia naskiĝa urbo, de longe sangigita de bataloj kies unu kaŭzo estas diverseco de l' lingvoj kaj neebleco sin kompreni. ... La Esperantistoj ne estas sufiĉe malsaĝaj por kredi ke internacia lingvo certigos ... universalan pacon ; tamen oni povas esti certa ke la ideo de Esperantismo enhavas pli altan signifon ol praktikan utilecon de helplingvo. Ne la praktika celo, sed la antaŭvido de l' estontaj benoj por la homaro kondukis D-ron Zamenhof sur la vojo.

Cl.- Ĉi-tiu parolado plena je altaj kaj nepersonaj pensoj, ofte interrompita de frenezaj aprobaĵoj [faras] tre grandan impreson sur la aŭskultantaro. Poste oni aŭdas mallongajn paroladetojn de ĉiunaciaj delegitoj laŭ alfabeto de l' landoj. ... S-ro Michaux, la organizinto de l' Boulogne'a Kongreso, diras france amuzigan alvokon propagandan por altiri la ĝenevanojn ne ankoraŭ esperantistajn. Fine, D-ro Leono Zamenhof, frato de l' elpensinto de Esperanto, eldiras belan poezion.

A.- La duan tagon okazis la unua Ĝenerala Kunsido, dum kiu oni [ĉefe] pridiskutis la proponon de S-ro Carles de Beziers, krei esperantistajn konsulejojn.

Cl.- Vespere okazis la Teatra Vespere.

A.- Théophile Renard konkludas la recenzon de la pritraktita programo, kies ĉefa teatraĵo estis la ploriga drameto Floro de l' Pasinto de Edmondo de Amicis per tiu prava kritiko : « Kelkaj bedaŭris ke oni ne ludis kelkajn scenojn de Wilhelm Tell, kaj ke oni elektis « plorigan dramon anstataŭ ridigan komedion » sed malgraŭ tiu riproĉeto la teatra vespero estis por ni mirinda sukceso. »

Cl.- La tria tago estis dediĉita al ŝipa ekskurso al Vevey. Ĉar la ŝipo alvenis en tiun urbon antaŭ la fiksita horo, sinjoro Mallet, la organizanto, devis kuri por serĉi la muzikistojn, kiuj devis konduki la esperantistaron al la du hoteloj rezervitaj por la tagmanĝo. Kaj jen priskribo de omaĝo okazinta je la reveno en Ĝenevo :

A.- « Suno kuŝiĝis sub Jura monto, kaj steloj lumiĝis, kiam la ŝipo alvenis en Ĝenevo. Dro Zamenhof eliris inter la lastaj el [la] ŝipo kaj sekvis sian vojon inter du [vicoj] da esperantistoj, kiuj varme akklamis lin ; tuj post li flugis supre la Esperanta standardo alte tenata de niaj junaj Ĝenevaj samideanoj. »

Cl.- La kvara tago estis ĉefe dediĉita al ĝenerala kaj privataj kunvenoj.

A.- Je la kvina tago, post Ĝenerala Kunveno okazis la Solena Ferma Kunsido, dum kiu Sinjoro de Beaufront rakontis pri vizito, kiun li faris al Sinjoro Ernest Naville. Ni citas : « S-ro de Beaufront ne volas konservi la fratan kison kiun donis al li S-ro Naville kaj li petas de D-ro Zamenhof la permeson transdoni al li tiun kison ; D-ro Zamenhof afable konsentas kaj ili sin interkisas longe, meze de aplaŭdoj ; tiu-ĉi gesto, kvankam diverse ŝatata, faris tamen impreson sur ĉiuj, ĉar vidante ĝin, oni ne povis ne memori la malbonajn tagojn, tiel mallumajn kiujn ambaŭ vivis longatempe. »

Cl.- Kiam Ernest Naville aŭdis pri tiu okazaĵo, li tuj reagis dirante, ke neniam li kisis sinjoron de Beaufront.

A.- Vespere la komandanto Charles Lemaire, en uniformo de belga artileria oficiro, prezentis paroladon kun lumbildoj pri siaj vojaĝoj en Kongolando. Jen citaĵo el la raporto : « Li prezentas al ni la vivon, la kutimojn, la simplan psikologion de l' nigruloj, kiuj tamen estas homoj respektindaj. »

Cl.- La dimanĉon 2-an de septembro, antaŭ la foriro de la svisa vojaĝo, kiun partoprenis 250 personoj, okazis protestanta kaj katolika diservoj.

A.- Notinde estas, ke en la ekspoziciejo staris statuo de Sinjoro Schaufenbühl titolita « La Esperantistino » Ni nin demandas, ĉu nun ie troviĝas tiu skulptaĵo ?

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Geaŭdantoj atentu ! Ekde la monato majo ŝanĝiĝos niaj elsendhoroj kaj tagoj. Niaj prelegoj aŭdiĝos ĵaŭde kaj sabate, kaj tiuj de d-ro Arthur Baur lunde kaj ĵaŭde. Elsendhoroj : 19a kaj 23a horoj. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !